The
British Esperantist

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

Vol. XXXV, No. 505/506 May/June, 1947

THE B.E.A. EXAMINATIONS

Ever since its foundation in 1904, the B.E.A. has had for one of its objects the holding of examinations in Esperanto, and this part of its work has always been regarded as very important. For many years examinations in Esperanto have been conducted by other educational bodies also, *e.g.*, the Royal Society of Arts. But the Association's own examination system has always been maintained in operation, and improved and extended as the need has arisen.

This article gives some particulars of the B.E.A. examinations, largely—but by no means exclusively—for the benefit of the many new Esperantists among our readers. It contains, firstly, brief details of the examinations, and secondly, some hints of a general nature to assist candidates in preparation for them.

THE EXAMINATION SCHEME

The Association holds examinations of two kinds, by attendance and by correspondence ; and in three grades : *Elementary*, *Advanced*, and *Licentiate*. A combined prospectus of the elementary and advanced examinations is issued free of charge, and specimen papers cost 3d. each. There is an inclusive charge of 6d. for the prospectus and specimen paper for the Licentiate examination.

The Elementary Attendance Examination may be conducted at any time and at any convenient place ; any holder of the Advanced Diploma may act as a local examiner on behalf of the Association. This examination lasts two hours, and consists of a written part and an oral part. The examination fee is 2s. 6d.

The Elementary Examination by Correspondence can be taken at any time by arrangement with the Association. It consists only of a written paper. Candidates are given one month to answer this, and reference to books is not prohibited. A higher standard of performance is expected here than in the case of the Attendance Examination. The examination fee is 5/-.

The Advanced Diploma is awarded to every candidate who passes both the written and the oral parts of the Advanced Examination. The Written Part is taken by correspondence, the time allowance being two months, and the fee 10s. The Oral Part must be taken before a Special Examiner of the Association (a list of Special Examiners can be obtained from the Secretary), the fee being 2s. 6d.

The Pass Mark for the Elementary Examinations and for the Written Part of the Advanced Examination is 65%, and at least 85% is required for Distinction. The Pass Mark for the Oral Part of the Advanced Examination is 75%.

The Licentiate Examination is held only by an Examiner specially appointed by the Association for this purpose. It consists of written and oral parts. Candidates are required to possess a considerable knowledge of the history and literature of Esperanto, as well as linguistic attainment of a high standard. Entry is not restricted to those who have obtained the Advanced Diploma. Before being admitted to the examination proper, each candidate must submit a preliminary essay of 1,000 words. The examination fee is 20s., of which 2s. 6d. is payable when the preliminary essay is submitted.

HINTS TO CANDIDATES

Before entering for one of the examinations, the student should consider whether he has a reasonable chance of success. Advice may be obtained on this point from his class teacher or correspondence course tutor or from some other experienced Esperantist. (Those who obtained the Advanced Diploma some years ago by sitting for the old attendance examination,

and who are thus approached for advice, should note that in recent years there has been a gradual rise in the standard of the advanced examination.)

In preparing for the examination, one should not limit oneself to a study of the grammar, but should also do as much reading as possible. Experience shows that candidates often fail to realize the importance of this matter. But a class teacher or correspondence tutor can impart only the skeleton of the language; it is for the student himself to clothe the skeleton with flesh. Reading helps to increase the vocabulary and to create a sensitiveness to word order and a natural style. Before sitting for the examination, it is advisable to work through a specimen paper as nearly as possible under examination conditions, and to submit the attempt to a more experienced friend for criticism. Where an attendance examination is to be taken, the time taken to work through the specimen paper should be compared with the time allowance for the examination. This will give the candidate guidance as to his ability to complete the examination in the allotted time. If he feels that he cannot work fast enough to do this (perhaps because he writes very slowly), he should make up his mind not to attempt the whole paper, but to do as much of every question as he can complete reasonably thoroughly.

Before beginning to answer the examination questions, the candidate should first read the instructions very carefully, to ascertain just what he is required to do. Very many candidates lose marks quite unnecessarily through insufficient attention to the instructions, either by attempting more questions than required, by failing to answer every part of a question, or by doing something quite different from what is asked for.

In translating, one should not give two or more alternative versions; the best and most expressive should be chosen. Passages should not be translated word by word, as this usually results in a rendering which is unnatural, if not actually incorrect. The finished translations should be read aloud (*sotto voce*, of course, in the case of attendance examinations !), as this gives a good indication as to the naturalness of the language employed.

All work should be written as neatly as possible. If it is found necessary to make any alterations, this should be done very clearly, by crossing out the original passage and re-writing it correctly. Though additional marks are not awarded for neatness, it is well to bear in mind the possibility that an untidy paper may lead the examiner to misread what one has written.

Time should be left for re-reading the whole paper at the end of the examination, and for making any final amendments which this may show to be desirable.

ALEC VENTURE

BOOKSHOP NOTES

Literatura Mondo Publications—*Enciklopedio de Esperanto* is out of print. We received this information soon after the publication of the last *B.E.* and we regret that we were unable to fulfil a number of orders.

Other publications of these well-known publishers are listed on page 3 of cover. Early application is advised.

Internacia Gramatiko by Kitzler is again available. Price 3/–, postage 2d.

Germana Ŝlosilo is now out of print.

Vivo de Zamenhof is in print again. Price 5/–, postage 5d.

Tra la Jaro, direct method text-book by Lucy Waddy. New price 2/3 (but still worth it !), postage 3d.

Malgranda Revuo—No. 1 of 1947 now in stock. Price 1/6, postage 2d. Standing orders accepted.

BOOKSHOP SERVICES

May we remind you :—

Deposit Accounts—You may avoid the nuisance of sending small and frequent payments for books by opening a Deposit Account against which orders can be invoiced. Such Accounts may be opened by sending £2 or more.

Standing Order List—May we add your name to receive a copy of each new book as published ? State whether cloth or paper binding is preferred.

Book Tokens exchanged or supplied. Tokens cost 3/6, 5/–, 7/6, and 10/6 (two can be combined on gift card). Service fee 3d. Please note that tokens cannot be accepted in payment of accounts.

Esperanto and English Books — Please remember that the B.E.A. can obtain for you any Esperanto or English book now in print and available in Britain.

ESPERANTISTS IN GERMANY AND AUSTRIA

The B.E.A. frequently receive requests from these countries for the name of persons willing to correspond. If you care to help in this connection, kindly send a card and we will forward a German or Austrian letter to you.

NEW BOOKS

Order starred books from the B.E.A., others from the address given.

***Antonio kaj Kleopatro** — *William Shakespeare. Trad. Stephen A. Andrew. Esperanto Publishing Company.* 96 *pp., 2s. 6p., afr. 2p.*

Ja kuraĝulo estas tiu, kiu provas traduki unu el la plej gloraj dramoj de Shakespeare, ĉar jam antaŭe li scias, ke la rezulto estos nur pala ombro de la originalo. La vortojn oni povas traduki, kaj la skeleton de la dramo konservi, sed la majeston, la noblecon, la atmosferon, entute la *efikon* de la originalo povus alilingvigi nur tradukisto elstare brila.

Nu, S-ro Andrew ne pretendas esti tia geniulo. Antaŭparole li difinas sian limigitan celon : "ne nur efektivigi sufiĉan klarigon de ĉiu dubsenca esprimo en la originalo, sed ankaŭ kiel eble plej multe faciligi la kompreneblecon de la dramo en ĉiu alia rilato". Por simpligi la taskon, li ne imitas la senriman versformon de la originalo, sed faras tradukon tute prozan. Tiu limigita celo estas laŭdinda, kaj fakte li sukcesas grandaparte ĝin trafi ; do ni gratulas lin.

Komparante la tekstojn Anglan kaj Esperantan, mi ricevis du fortajn impresojn. La Anglaj senrimaj versoj de la originalo prezentas ian vortbildon, kiun oni devas ensorbi kiel tuton ; kaj tion farante, oni ricevas emociigan impreson. Kontraŭe, la Esperantaj frazoj de la traduko estas konstruitaj el raciaj elementoj, kaj efikas pli rekte je la menso de la leganto. La unua incitas la imagon, kaj iel mistike vokas al la homareco de la leganto : la dua precize kaj kvazaŭ afereme klarigas la penson de la verkinto. Jen, tutsimple, la diferenco inter majstraĵo de poeto kaj prozaĵo de lertulo.

Ni tamen ne forgesu, ke la dramo estas *teatraĵo*, kaj ke por taŭge juĝi la sukceson de la traduko, ni devus ĝin aŭdi kaj vidi en la teatro. S-ro Andrew opinias, ke krom Zamenhof mem, neniu sukcesis inde Esperantigi Shakespeare. Eble li pravas. Tamen ni, kiuj ĉeestis la prezenton de "Sonĝo de Someromeza Nokto" en Bristol pasintjare, povas certigi, ke F-ino Briggs kaptis ion pli ol la nura signifo de la vortoj. Ŝia traduko, en la buŝoj de inspiritaj geaktoroj, ĉarmis la orelojn kaj rekreis la fean, romantikan etoson de la originalo. Sendube la traduko de S-ro Andrew estas meritoplena. Sed ĉu sur la scenejo liaj rektaj kaj logikaj esprimoj same efikus, kiel la noblaj (sed iam malfacile kompreneblaj) frazoj de Shakespeare, mi dubas.

Liberiginte sin de traduko metrika, S-ro Andrew akiris plenan liberecon pri vortordo, kaj tio sendube helpis al klareco. Tamen la "ordinareco" de la lingvaĵo en la traduko povas malhelpi al la elmontro de alteco kaj profundeco ĉe la karakteroj de la roluloj. En siaj plej noblaj kaj plej malesperaj momentoj en la traduko Antonio parolas en lingvaĵo, kiu ne multe diferencas de tiu de la ordinara klerulo. Same en la traduko Kleopatro ne estas tiom majesta en sia koleregо, aŭ tiom vere sorĉoplena en sia amfrenezo. Iel io mankas.

Skribinte tion, mi ripetas, ke S-ro Andrew sukcesis fari meritoplenan tradukon konforme al sia limigita celo. Zorge mi komparis linion kun linio, kun helpo de glosaro por la Angla originalo ; kaj mi konstatas, ke preskaŭ senescepte li kaptis la esencon de la frazo. Pri bagateloj oni povas ĉikani : la superflua uzo de *kiu ajn*, *ĉu*, *ĉu ne* : enŝteliĝis kelke da Anglicismoj—*Estu mallonga* (*koncize, do*), *vi havis* (*ĝuis*) *gajan tempon* : ne mankas eraroj—*nesatigeblaj saŭcoj* (ĉu saŭco estas satigebla ?), *masiva* (*martelita*) *oro*, *reveni* (ofte uzata anstataŭ *reiri*), *fiŝkaptanta kapablo* (*kapablo fiŝkapti*). Iufoje S-ro Andrew forgesas, ke la aktoro devas elbuŝigi la vortojn : ekz., *la neniam-diboĉlaciĝebla Antonio* !

Preso kaj papero konformas al la kutime alta nivelo de E.P.C. (tamen sur p. 17 *ŝvito-dorantoj* d.e. *ŝvit-odorantoj*). La prezo estas modesta, kaj la entreprenemo de E.P.C. meritas nian subtenon.

W. A. GETHING.

***Premiaj Romanetoj**—*Originale verkitaj de konkursintoj. Eldonita de The Esperanto Publishing Co., Ltd.,* 95 *pp., broŝ., 2s. 6p., afranko 2p. Papero bona, preso klara.*

Jen utila aldono al la literaturo Esperanta. En la nuntempa mondo, kie la vivo tiom urĝas kaj rapidas, preskaŭ ĉiu Esperantisto trovas tiom da aferoj, kiujn li deziras aŭ devas fari, ke ofte mankas al li sufiĉe da tempo por ĝui la tralegon de longa romano. Por li tial tre havinda estus libro kies grandeco konvenas al lia poŝo kaj kies enhavo konsistas el aro da mallongaj romanetoj. La unuopaj eroj de tia libro devus esti interesaj kaj diversecaj, verkitaj laŭ simpla klara stilo, kiu ne postulas multe da cerbumado por diveni la intencon de la aŭtoro aŭ grandan vortaron por serĉi la signifon de neoftaj vortoj. La libro devas esti tia, kian oni povas facile legi en la vagonaro aŭ omnibuso dum vojaĝeto hejmen post la labortago ; aŭ, se necese, dum oni staras en linio por aĉeti la familian haringon aŭ terpomon.

Tia libro estas "Premiaj Romanetoj". Ĝi havas ĝenerale stilon simplan kaj

klaran; la eroj estas diversaj kaj bone miksitaj, kaj prezentas literaturan pudingon tre bongustan kaj malpezan. Mem instruisto de Esperanto, mi bonvenigas la novan libreton kiel utilan legolibron por kursoj kies membroj iom progresis. Ĝi taŭgas por kurso en ĝia dua jaro, aŭ—se la lernantoj montras entuziasmon kaj inteligenton—eĉ en la dua periodo de la unua jaro.

Inter la dudek tri verketoj estas kelkaj pri fantomoj, du-tri ĉarmaj aludoj al la Naturo, kelke da rakontoj el la ĉiutaga vivo, fantaziaĵoj, kaj bonhumoraĵoj. Unu tagon, en vagonaro, mi ŝoketis miajn kunvojaĝantojn kaj hontigis min mem per subita ekrido pro unu el la humoraĵoj.

Mia okulo ne sukcesis rimarki eĉ unu preseraron en Esperanta vorto. La sola preseraro rimarkita ne multe gravas, krom al sportistoj, kaj precipe al la Chelsea piedpilka klubo. Mi neniam legis pri ludo inter Chelsea kaj Brentwood, kaj mi supozas, ke ne plaĉus al Chelsea la sugesto, ke Brentwood—se ja ekzistas tia klubo—povus ilin venki. Supozeble oni intencas aludi al Brentford. En la libro okazas kelke da vortoj ne troveblaj en la vortaroj: ekzemple, *suspiro* (sigh), *trado* (trade wind), *braso* (brace, guy, vang). Estus konsilinde, aldoni noton pri ili en estonta eldono.

Verŝajne, nova eldono baldaŭ estos necesa, ĉar mi opinias, ke ĉi tiu estas bona libro, kiun la Esperantistaro multe aĉetos. Ni vidas en ĝi la verkojn de dek kvin aŭtoroj, kies verkoj promesas bone por la estonteco. Mi gratulas al EPOKO pro la apero de ĉi tiu libro, kaj proponas, ke ili baldaŭ kuraĝigu la verkintojn per nova konkurso por venigi plenan rikolton por dua libro samspeca.

ROBERT MURRAY.

***Kvara Rapsodio** — *Redaktis Ferenc Szilágyi. Eldona Societo Esperanto, Stockholm.* 48 *pp., broŝ.*, 3*ŝ.*, *afr.* 2*p.*

Ĉi tiu libreto konsistas el 15 eroj de prozo kaj 9 poemoj verkitaj de 18 diversaj aŭtoroj. 10 el la prozaj verkoj kaj 4 el la poemoj estas originalaj. Kompreneble oni ne atendas, ke "Rapsodio" estu metoda, aŭ aranĝita laŭ plano; tamen laŭ la Enkonduko "ĝia tendenco estas klara: montri kaj demonstri la vivon de Esperanto, kaj ĝian ligiĝon al la aliaj gravaj sociaj problemoj; esti interesa, varia, sen mal-altigo de la nivelo". Certe la verkoj estas tre diversaj. Oni povus ilin klasigi jene:

(*a*) *La Vivo Esperanta:* poemoj de Baghy, Kalocsay, kaj Zahariev, kun karakteriza historieto de Stellan Engholm en lia simpla klara stilo.

(*b*) *Parto amuza kaj pure literatura:* Rusa komedio pri la servisto de eksadmiralo; Sveda popolfabelo pri viro, kiu ŝanĝis taskojn kun sia edzino; historieto de babilado interplaneda; Finlanda fabelo; la memamo tra la okuloj de knabeto.

(*c*) *Kun intereso ĝenerala:* provo trovi en "La Songô de Someromeza Nokto" klarigon de sentenco verkita de Schiller; artikolo pri strangaĵoj en la besta vivo; la problemo de tradukado el la Sveda poezio en Esperanton.

(*d*) *Biografio:* skizo ilustrita per poemoj de la Estona poeto Hendrik Adamson, kaj bildo pri la vivo de La Rouchefoucauld, kun kelkaj el liaj "Maksimoj".

(*e*) *Historio:* pri la Viena cenzuro de la 19a jarcento, kaj pri la juĝo de la Historio.

Jen vera "Rapsodio", se la signifo de tiu vorto estas kolekto de ideoj sen-interrilataj. Efektive mankas io pri la rilato de Esperanto "al gravaj sociaj problemoj", krom aludo de la redaktinto mem en artikolo kiu resumas Svedan verkon pri la mondmoralo. Kelkaj frazoj en tiu artikolo estas neklaraj; sed entute la lingva stilo de la libro estas bona. Poemo de Totsche (*Nordo*) enhavas kelke da dubaj vortoj: ekz., *arktika* anst. *arkta; devoro? fragila? duro?* Estus helpe, se poetoj kiuj sentas bezonon al neologismoj donus ilian signifon. Mi rimarkas ankaŭ, ke Szilágyi uzas *cenzoro* anst. *cenzuristo; kaoso* anst. *ĥaoso*.

Troviĝas nur kelkaj da preseraroj, el kiuj kvar estas sur la unuaj kvin paĝoj.

FRANK CURTIS.

Facile Lerni Esperanton! G. P. de Bruin. 56 *pp., f.* 1.10. *Eldonis Libroservo F.L.E., Postbus* 8002, *Amsterdam-W.*

Lernolibro en formo de gradigita legaĵo, kun instrua teksto en la Nederlanda lingvo. Lingve ĝenerale tre bona, Stranga uzo de *ok oble* (k.s.) anst. *okoble*.

"Bazoplano pri la Rekonstruo de la Rotterdama Centro"—This interesting map of the projected reconstruction of the ruined city centre is published with Esperanto annotations.

La Mistero de Maria—*Verkis Louis-Marie Grignion de Montfort. Tradukis M. Wigbertus van Zon.* 64 *pp.*, 4 *respond-kuponoj, ĉe L. G. C. de Jong, I.K.U.E., Roelofarendensveen, Nederlando.*

Serio de legaĵoj por Romkatolikoj, por instigi al la kulto de la Virgulino Mario. Ĝi jam aperis en 24 aliaj lingvoj. Ĉu kelke da terminoj uzitaj estas vere necesaj, devas decidi la teologoj: *mizerikordo, mortifiki* (*bridi*), *satisfakcii* (*repagi, kontentigi*), pekoj *veniala* kaj *mortala*. *Abandono* (*forlaso*) kaj *perseveri* ŝajnas dube necesaj.

Socikredito : Mallonga Klarigo—Dupaĝa flugfolio pri la principoj de Socia Kredito, kiu postulas (*a*) starigon de Nacia Kredito-Departemento; (*b*) aplikon de Preza Diskonto, kaj (*c*) distribuon de Naciaj Dividendoj. Havebla laŭ peto al Social Credit Committee, Gordon House, Carrington St., Nottingham.

En unu paragrafo ni legas, ke la Esperantistoj kredas, ke komuna lingvo alportos pacon al la homaro. Sed kontraŭ tiu diro ni ĉiam protestis: samlingveco certe ne certigas pacon. Tamen, Esperanto forigas unu ĉefan baron al interkompreno, kaj tial estas potenca helpilo al internacia amikeco. Sen kompreno ĉu vera amikeco estas ebla ?

***False Friends**—Amended reprint from our last issue. Useful for the serious student, and for study circles and classes. Price 3p., postage 1d.

***B.E.A. Booklist (March, 1947)**—We are pleased to see this list regaining its pre-war size and variety. It is a useful guide to the reader, and also demonstrates the scope and variety of Esperanto literature now available. Price 3d., post free.

"The New Man" ("an organ for socialist culture and world outlook", 1/- bi-monthly, from 6 Queen Square, W.C.1) has among its principles the substitution of "a world language for the present localized lingoes" (p.4). "Esperanto is the most immediately practical tongue" (p.8).

"Juna Espero" is a four-page magazine—3d. a copy—published for schools by SBET (Editor: T. K. Slade, 7 Southview Rd., Southampton). We hope that from this humble beginning it will develop into something much bigger, and unite children in all schools where Esperanto is taught. It is worthy of support by all teaching children's classes.

The Bern Congress—The second issue of "Svislando Vokas Vin" (the official congress gazette) gives much useful information. 1,157 persons from 30 countries have joined the congress to 1st April.

The XIth Sokol-Festo in Praha (June–July, 1948) sends an explanatory leaflet in Esperanto. This may be had (as also an illustrated Esperanto brochure about the Sokol movement, now in preparation) on application to Sletova Kancelar, Komitato de la Sokola Kongreso, Tyrŝuv Dum., Praha III, Czechoslovakia.

***"Afrika Revuo"**, antaŭe "Verda Flamo" (Jarabono 6ŝ., aŭ 15 respondkuponoj, ĉe 5 Rue Savorgnan de Brazza, Casablanca, Maroko) enhavas artikolojn pri Maroka vivo, la Esperanta movado, novelojn, korespondanoncojn, k.a.

"La Familia Rondo", Spring issue (6d. from Hylda Mayne, Tarlton, Cirencester, Glos.), as usual contains many articles of interest, suitable for class reading.

"Kristana Revuo", la organo de Kristana Unuiĝo de Nederlandaj Esperantistoj (Jarabono 6ŝ., apartaj numeroj 6p., ĉe Vlierbookstraat 666, Den Haag, Nederlando—ne konfuzu kun la samnoma gazeto iam eldonita de F-ino Hanbury en Anglujo) enhavas artikolojn valorajn kaj interesajn. Ekz., la Aprila numero, krom artikoloj pri Basic kaj pri adasismoj, enhavas detalan esploron pri diversaj demandoj: Kio estas la Interna Ideo ? Ĉu la i.i. estas *inherenta* en Esperanto (nedisigeble ligita al ĝi laŭ sia naturo) ? Kion diris kaj kredis Zamenhof pri ĝi ? Ĉu ĝi estas ideo Kristana ? Pri Hilelismo (Homaranismo): difino kaj historio. Ĉu la homaranismo mortis ? Du Esperantismoj: oficiala kaj neoficiala ? Ni ne citos la respondojn donitajn. Oni tamen prezentas faktojn historiajn, kun pripensindaj komentoj de vidpunkto Kristana.

***"American Esperantist"**, Nov.-Dec. 1946 (7/6 per annum from B.E.A.), has three very informative articles about the United Nations' language difficulties on Long Island; Babel in the U.N. (various translation systems adopted and their difficulties); and the utility of Esperanto to a modern traveller (Mark Starr) in Japan.

We learn that from April this year all Japanese school children will learn something about the life and work of Zamenhof, for an essay on the subject written by Miyake Shihey, Executive Secretary of the Japanese Esperanto Institute, will be incorporated in a reader for "all grade schools of the country". The Japanese Ministry of Education invited contributions to this new reader, and received 1,225 essays and poems. The essay about Zamenhof was one of the twelve chosen.

"Introductory Hebrew Grammar" (T. & T. Clark, Edinburgh) is a standard work for students of Hebrew. On the "Causative Form" it writes: "A rough analogy may be found in Latin *cado, caedo;* German *fallen, fällen;* English *fall, fell; rise, raise;* a still closer analogy in the causative suffix *ig* in Esperanto: e.g., *veni*, to come, *venigi*, to cause to come, send for; *sani*, to be healthy, *sanigi*, to make healthy".

LOCAL NEWS

Blackburn—*Conversational Circle :* Mon., 7.30, at The People's College, Whalley Range.

Brighton—Class under Mr. E. J. Smith at Friends' Centre, Ship St., Thurs., 7.15.

Bristol—*Latest activity :* a class for German prisoners of war. Other groups might well copy.

Glasgow — During the summer the Glasgow Esperanto Society meets at Playhouse Café, Mon., 7.30. Visitors welcome. *Sec.*, Miss Wilson, 119 Earlbank Avenue, Glasgow, W.4.

Lancs. and Cheshire Federation—To honour the memory of Mr. W. B. Currie, the Federation offers a prize of a book worth 10/- to the most successful candidate from the Federation district in each of the three R.S.A. Examinations. Already in Blackburn and Darwen 13 have decided to enter for the Elementary examination, and 9 for the Intermediate.

Leeds—Many notices in the local press, two adult classes, a school class, several propaganda lectures, regular group meetings, all evidence healthy life, and promise a good harvest.

Liverpool—*Two Ten-week classes :* (*a*) *Elem.*, 6.0, (*b*) *Refresher*, 7.45 ; both Tuesday. Also *Literary Circle* (Wed., 7.0), for the study of selected works, play reading, and translation. All at Mount St. Evening Institute, off Hope St., Liverpool 1. Fee for each class : 1/-.

London Club (153 Drummond St., N.W.1, 7.0). Majo 16, Miaj spertoj en Esperantujo. 23, Tradukoproblemoj. 30, Mi opinias, ke . . . Junio 7, Debato : Ke la kaŭzo de milito estas ne morala, sed ekonomia. 13, Muziko. 20, Kemiterapio. 27, Spertoj de Cseh Instruisto.

London—Divine Service in Esperanto (undenominational), 3.15, at St. Barnabas' Church, Pimlico Rd., S.W.1. *Speakers :* 11 May, E. B. Johnson. 8 June, Rev. Hayman. *Tea* 1/3.

London, S.W.17—An L.C.C. Class at Tooting Broadway Commercial Institute, Mon., under Mrs. Grout.

Manchester—The Esperanto Society now has 110 members. *Meetings :* 2.30, at 49 Lower Mosley St. 17 May, Mia vivo dum la milito. 28 June, La karikaturoj de David Low.

Scottish Federation—From June onwards the Federation Bulletin will be a printed magazine, *Esperanto en Skotlando.* Anyone wanting a specimen number (especially if a Scot) should write to the editor : Mr. W. Clarke, 9 Howard Crescent, Dunfermline. Annual subscription (four issues), 2s.

Swindon—The Annual Report of the group gives details of much steady work in various directions. *New Secretary :* Mr. K. G. Mundell, 2 Lansdowne Rd.

Vancouver—A propaganda meeting on 22 Feb. in the Vancouver Institute attracted an audience of 130. Dr. E. Morrison (Professor of English at Columbia University) spoke against Basic, and Prof. F. J. Belinfante, Professor of Physics at Columbia University, illustrated the ease with which Esperanto can be learned, and the difficulties of English for a foreigner.

"One World" (National Peace Council, 144 Southampton Row, W.C.1 ; annual subscription 3/-, one number 3d. post free) will publish in its June issue an article *The Case for Esperanto.* We recommend this to speakers and propagandists as likely to be helpful.

"Psychic News" (3d. weekly, 144 High Holborn) is publishing an interesting series of short lessons by Colin Evans. In the first issue the Editor makes some sympathetic references to Esperanto.

The Bible in Esperanto—There is a discrepancy between the figures in our last issue (p.34) and those given in July, 1934 (which we cannot now verify). Here are the exact figures of sales by the British and Foreign Bible Society to 31 March, 1947 : *Bibles*, 9,605 ; *Nova Testamento*, 12,704 ; *Portions*, 27,000.

Some 50 printers' errors in the first edition were corrected in the 1927 reprint. Readers who have spotted printers' errors (not questions of text or translation) **in the 1927 edition** please write to Mr. Butler, 36 Penrhyn Rd., Kingston-on-Thames. Errors in the following verses are already known, and need not be mentioned : Gen 17/12 ; El 26/29 ; 28/30 ; Read 12/11 ; I Reĝ 7/22 ; 8/8 ; 18/34 ; II Reĝ 7/12 ; 18/23 ; II Kron 6/41 ; 15/8 ; Neĥ 5/18 ; Ps 3/5 ; 7/2 ; 23/4 ; 86/6 ; Alt 8/5 ; Jes 16/8, 9 ; 36/8 ; 53/12 ; Jer 32/44 ; 33/11 ; Mar 6/5 ; Luk 22/66 ; Joh 6/55 ; Ag 5/10 ; Rom 4/7 ; II Kor 1/24 ; 5/11 ; I Joh 3/23.

PRI ETENDIĜO DE SIGNIFO

Iam lernanto demandis al mi, "Kiel vi tradukus, "I was specially interested in the geological section" ? Mi respondis : "*Precipe interesis min la geologia sekcio.*" "Nu," li daŭrigis "kiel vi tradukus," There was a small audience, principally of women" ? Mi respondis : "*Estis malgranda aŭskultantaro, precipe el virinoj.*" "Ha," li diris, kun iom da triumfo, "vi uzis la saman vorton por traduki "specially" kaj "principally", kaj, laŭ mi, la signifoj en la du frazoj tute diferencas. Ĉu vi ne devas uzi apartajn Esperantajn vortojn ?"

"Mi ne *devas,* sed mi povas tion fari. Ekzemple, mi povus uzi *ĉefe* en la unua kaj *plejparte* en la dua."

"Do mi opinias, ke vi devus uzi apartajn vortojn por apartaj signifoj."

"Mi iom kunsentas kun vi, tamen mi ne konsentas pri via konkludo. Vi ankoraŭ ne plene komprenas, ke en ĉiu lingvo vortoj, per natura evoluo, nepre posedas etendiĝon de signifo, kiu etendiĝo, per figura uzado kaj aliaj priskribo-rimedoj, ofte disvastiĝas sur la etendiĝo de aliaj vortoj, eĉ ĝis konfuzo. En tiu rilato la Angla lingvo multe kulpas, kaj se vi persiste penos traduki apartajn vortojn, vi nepre trovos multajn similajn malfacilaĵojn. Ni konsideru tian grupon kian *Principal, Special, Particular, Especial* " kaj mi tiris de sur la breto ekzempleron de Angla vortaro, kaj pasigis ĝin al li. "Serĉu la signifon de 'Especial' " mi diris. Li foliumis la volumon, kaj trovinte la lokon, laŭtlegis : "Especial= special, particular, principal, distinguished", kaj levis la okulojn kun esprimo iom komika.

"Ne tre helpema, ĉu ?" mi rimarkis.

"Tute ne ! Sed kion fari ?"

"Ne aspektu tiel senespera ! La malfacilaĵo ne estas grava. Tiu libro diras la veron, kaj sendube vi iufoje uzis aŭ aŭdis tiun solan vorton laŭ ĉiu aparta signifo—kaj trovis nenion duban. Egale kun Esperanto, aŭ iu ajn alia lingvo, vi elektos ĝustan vorton se nur vi pensas en la lingvo, kaj ne pensas Angle penante tujan tradukon. Nu, ni konstatu la signifon de *Precipe* !" kaj mi deprenis mian *Plena Vortaro* kaj legis : *Precipe : Adverbo signifanta 'antaŭ ĉio, ĉefe, pli ol ĉio aŭ ĉiu alia'.* Nu, tie ne estas troa amplekso, tamen estas etendiĝo, ne unu sola preciza signifo. Ni provu, ĉu la vorto vere ampleksas la distingeblajn signifojn en viaj frazoj. 'Pli ol ĉio interesis min la geologia sekcio.' "

"Tiu alĝustiĝas," li konsentis.

"Kaj nun, la dua : 'Estis malgranda aŭskultantaro, pli ol ĉio alia el virinoj'."

Ĉi tiun fojon lia konsento estis iom duba, kaj evidente la problemo ne tute klariĝis. Ne volante lasi lin iom perpleksita mi direktis lian atenton antaŭen al difinita tasko :—"Serĉu ekzemplojn de vortoj kies originala signifo iom etendiĝis, kaj notu kiel alilingva vorto havanta tre simila fokuson ofte etendiĝas tute simile, kaj tiel ebligas rektan tradukon, ĉu en la originala ĉu en la pli figura uzo. Notu ankaŭ, ke la etendiĝo de iu vorto povas ampleksi etendiĝerojn de du alilingvaj vortoj kies fokusaj punktoj ne estas tre similaj al la fokuso de la unua vorto. Precipe, konstatu al vi mem la signifon de Esperanta vorto el la Plena Vortaro *en Esperanto :* kaj, fine, detenu vin for de vort-pro-vorta tradukado.

T. K. SLADE

BASIC ENGLISH

To supplement the note on this subject in our last issue, we print the following extracts from the proceedings of Parliament :—

Monday, 3rd March, 1947

MR. WILSON HARRIS : To ask the Minister of Education what use the Government proposes to make of the copyright of Basic English for which £23,000 has been paid.

MR. DAVID HARDMAN : The payment of £23,000 to which the Hon. Member refers was not made solely in order to acquire the copyright in Basic English, but was intended also to compensate Mr. Ogden for liabilities and losses incurred by him during the negotiations which were started by the Coalition Government two or three years ago following the publication of the White Paper (Command 6511). In order to secure the advantages of a widespread use of Basic English as a means of international communication and as a simple introduction to the English language, a Basic English Foundation is now being established and, subject to the provision of the necessary funds by Parliament, will be assisted by a grant-in-aid carried on the Vote of my Department. Suitable arrangements are also being made for the co-operation of my Department and the other Departments concerned with the Foundation in the furtherance of its work.

Tuesday, 11th March, 1947

SIR ALAN HERBERT : To ask the Minister of Education whether the Crown has acquired the copyright in Mr. Ogden's books on the subject of Basic English ; what other rights the Crown has acquired ; and why it was necessary to make a payment of £23,000.

MR. GEORGE TOMLINSON : The copyright which the Crown is acquiring is in the Basic

Standardised Word List and System. As regards the second and third parts of the question, I would refer the Hon. Member to the reply given on the 3rd March to the Hon. Member the Junior Burgess for Cambridge University (Mr. Wilson Harris), a copy of which I am sending to him.

Thursday, 13th March, 1947

Mr. WILSON HARRIS : To ask the Minister of Education what is the nature of the copyright in Basic English which His Majesty's Government has purchased ; and what there is in Basic English that can be copyrighted.

Mr. GEORGE TOMLINSON : As regards the first part of the question, I would refer the Hon. Member to the reply given to the Hon. Member the Senior Burgess for Oxford University (Sir Alan Herbert) on the 11th March, a copy of which I am sending him. I am advised that copyright can exist in a list of words, provided that its compilation involved skill or judgment or some sort of discrimination ; that Mr. Ogden has undoubtedly expended skill, judgment and discrimination in the compilation of his list of words which form the foundation of the Basic English System, and that he had copyright in it.

ĈU VI PAROLAS ESPERANTE ?

Portante la verdan stelon, oni ofte ricevas interesajn demandojn. *Kion signifas la stelo ? Ĉu Esperanto estas facila ? Kie ĝi estas parolata ?* Tio liveras bonan okazon por propagando. Tamen, ne estas konvinke laŭdi la facilecon de la lingvo, se ni mem parolas ĝin nur pene kaj balbute.

Sendube, se pluraj Esperantistoj en vagonaro aŭ sur strato interparolas en Esperanto flue kaj nature, tio estas efika reklamo por nia lingvo. Ĉu vi iam provis tion ? Estas tre interese rigardeti la kunvojaĝantojn. Kiel scivoleme ili vin rigardas ! Eble vi aŭdas demandon : *Kiun lingvon oni uzas ?* Kaj kompreneble vi ĝojas, se iu respondas "Tio estas Esperanto : la Esperantistoj portas verdan stelon".

Baldaŭ venos la somero, la sezono de ferioj kaj vojaĝoj. Verŝajne multaj turistoj vizitos nian landon. Espereble, inter ili troviĝos Esperantistoj. Ni do ĉiam portu la stelon, por ke alilanda vizitanto nin ekvidu, kaj komprenu, ke ni estas samideanoj.

Tamen la eksterlanda Esperantisto ne demandos al ni pri la stelo aŭ pri la lingvo. Li ĝin uzos, por demandi pri aliaj aferoj. Eble li komencos jene : *Bonan tagon ! Ĉu vi parolas Esperante ?* Demando ŝajne iom stulta ; ĉar se ni portas la stelon, ni per tio montras, ke ni estas Esperantistoj ; kaj se jes, kial demandi, ĉu ni parolas Esperante ?—Aŭ ĉu tamen la demando efektive estas necesa ?

Multaj laboras por nia movado, propagandante, varbante, kolektante subskribojn por UNO, k.t.p. Tamen povas okazi, ke tiuj samaj personoj faras tute malbonan impreson, kiam iu venas kaj provas paroli kun ili Esperante. Ĉar se ili respondas nur pene kaj balbute, la ĉeestantoj forte dubos pri la facileco de la lingvo. Tre fuŝa reklamo !

La sperto instruas, ke ni ne faru al ni tro grandajn iluziojn, renkontante verdstelulon. Efektive, la stelo ne diras, ĉu li estas flua parolanto, aŭ nur balbutulo.

Sed kial ne ĉiu samideano ellernas Esperanton ? En kelkaj kluboj la membroj parolas preskaŭ sole Norvege. Ĉu do estas tiel malfacile paroli Esperante ? Tute ne ! Tamen, *oni devas fari komencon,* kaj ĝuste la komenco ŝajnas malfacila. Okazas eĉ, ke la klubestro sabotas Esperanton, kaj parolas Norvege, "por ke ĉiu komprenu" ! Karakteriza estas unu klubraporto en ĉi tiu numero : unue oni priparolas "aferojn aktualajn", kaj nur poste uzas la belan lingvon (do la lingvo ne estas afero aktuala !).

Konsentite, ne estas amuze interparoli kun mallerta Esperantisto. Post kelkaj provoj oni perdas la paciencon, kaj transiras al la Norvega. Tiumaniere la konversacio fariĝas pli facila—tamen malpli valora. Sekve de tio, iom post iom eĉ la lertuloj komencas paroli nur Norvege. Kaj se iu proponas Esperanton kiel devigan lingvon en la klubo, li renkontas tiom da kontraŭstaro, ke li tute perdas la kuraĝon.

Facile ni predikas, ke oni enkonduku Esperanton en la lernejon, en la radion, en la turismon, k.t.p. Sed ni malpli entuziasmas pri enkonduko de Esperanto en la Esperantan klubon. Strange !

Nia moto estu : *Esperanto en la Esperantan movadon !*

El "Norvega Esperantisto" (Aprilo 1946), *mallongigite.*

Amika Internacia Renkonto, Angers, France, 13–22 July, 1947. As it is very difficult for most French Esperantists under present conditions to go to Bern, this Congress has been arranged as a second-best. For details of a most interesting programme write F-ino Nouais, 28 Boulevard Descazeaux, Angers, Maine et Loire.

LA VALO DE VIZIO

Iam estis junulo, kiu havis la talenton de vortoj. Li ludis ilin, ĵonglis ilin; li ŝnure liniigis ilin kiel briletantaj bidoj (globetoj). Li verkis pri amo kaj morto kaj malamo, pri ĝojo kaj malĝojo kaj doloro, kaj pri multaj aliaj temoj, pri kiuj li nenion sciis; sed lia renomo vastiĝis tra la lando, kaj li fariĝis fiera.

Iun tagon okazis, ke li renkontis maljunulon, filozofon eminentan kaj tre saĝan; kaj en sia aroganteco la junulo sub ŝajnigo de humileco volis havigi al si lian laŭdon. "Mia filo," respondis la saĝulo, "viaj vortoj estas tiel belaj, ke mi tiom pli bedaŭras, ke ili ne vivos."

"Ne vivos?" ekkriis la junulo. "Kion ci volas diri, sinjoro?"

"Ili ne havas animon" respondis la saĝulo, kaj daŭrigis sian vojiron.

"Estas malvere!" kriis la junulo. "Miaj vortoj nepre devas vivi. Ili ja vivos—miaj belaj vortoj! Prefere mi mem mortus."

Tamen li estis malserena kaj elpaŝis en la mondon por scii, kia povus esti tiu "animo". Avide li demandis al tiuj, kiujn li renkontis dum sia pilgrimado.

"Vortoj!" ekkriis muzikisto. "Se la termondo estus hejmo perfekta, oni ne bezonus vortojn: la lingvo de la ĉielo estas Muziko."

"Vortoj" diris artpentristo malŝate, "plej bone restu neskribitaj. Ĉu vi volus revivigi la pasintecon? Ĉu vi volus transigi viajn pensojn en la estontecon? Nu, ilin bildigu. Vortoj ne multe valoras."

"Vortoj" ploris la funebranto, "portas neniom da konsolo. Ili estas simboloj delonge senpovaj. Malĝojo ne havas voĉon: kunsento estas muta."

"Vortoj!" ridis amindumanto. "Kiel necesas vortoj, kiam koro parolas al koro, kaj okulo al okulo?"

Do estis la junulo nemezureble senkonsola. "Ĉu vortoj estas nur nulo?" li meditis, "nur senvive naskitaj? Tamen la vortoj de la eminentuloj kaj saĝuloj de la pasinteco ankoraŭ vivas. Kiu instruis al ili la saĝon? Ho! ke mi trovu instruonton, por ke miaj vortoj vivu!" Kaj en sia malespero li kriis laŭte.

Tiam parolis la Silento . . .

"Mi estos tre pacienca" la junulo respondis, klinante la kapon. "Mi ne ribelos. Nur instruu min, ke mi donu al miaj vortoj tion, sen kio ili devas morti."

Dum multaj jaroj la junulo loĝis en la lando de Silento. Li suferis multajn aferojn kaj estis muta, ĝis fine venis tago, kiam li sentis, ke li nepre devas paroli—ke estas komisiita al li mesaĝo, kiun la mondo devas aŭdi. Li alvokis la vortojn, kiuj antaŭe estis liaj sklavoj, kaj ili venis obee, ĉar li estis ilia mastro kaj havis komandon super ili. Kaj ĉi tiun fojon la mondo aŭskultis. "Vortoj tiel belaj", ĝi diris, "devas vivi por ĉiam!" Sed al la viro estis indiferente, ĉu liaj vortoj mem vivos, ĉu ili mortos. Ili estis nur la ekstera vestaro de la spirito: ilia animo, li sciis, estas tiel senmorta, kiel lia propra.

MARY SOONES
trad. A. J. HOWARD HULME

LA PETSKRIBO

Jen la ciferoj ĝis 10 Aprilo:

Nederlando	..46621	Portugalujo ..	3322
Britujo	..22182	Germanujo ..	3087
Bulgarujo	..21460	Aŭstralio ..	2850
Francujo	..20373	Nov-Zelando	2495
Svedujo	..16515	Italujo ..	2204
Ĉeĥoslovakujo	15821	Egiptujo ..	1761
Jugoslavujo	..11740	Svisujo ..	1269
Norvegujo	..11732	Maroko ..	1018
Danujo	.. 7304	Grekujo ..	473
Aŭstrujo	.. 6970	Urugvajo ..	460
Finlando	.. 6325	Irlando ..	449
Polujo	.. 5590	Palestino ..	445
Argentino	.. 5370	Hispanujo ..	274
Belgujo	.. 5214	Kanado ..	257
Usono	.. 4368	Ceteraj lokoj ..	593
Brazilo	.. 4129		
Islando	.. 4065	sumo	240325
Hungarujo	.. 3589		

Ni esperas, ke legantoj daŭrigos la bonan laboron. Pluaj folioj por subskribo estas haveblaj senpage ĉe la Oficejo.

REMEMORO

Ankoraŭfoje mi per paŝoj pezaj
  Reiras al la monto da rubaĵo:
Salutas min mur-restoj kampomezaj,
  Ruinoj de l' iama posedaĵo.

Ĉi tie ludis iam la infanoj,
  Kaj en la ĉambroj sonis ĝojo riĉa;
Jen sidis mi kun plumo en la manoj—
  Mi estis kvazaŭ reĝo rev-feliĉa.

Ho, kiom amis mi objektojn ĉiujn,
  La kunligitajn firme al la koro!
Ne plu revidos mi karaĵojn tiujn,
  Pri ili restas nur la rememoro!

Silentas nun la rondo ruinara,
  Nur malproksime sonas urba bruo:
Jen iam estis mia hejmo kara,
  Kaj en la domo estis ĝoj' kaj ĝuo.

La karaj arboj portas foliaĵon,
  En la ĝardeno kreskas ia floro.
Rigardas mi iaman posedaĵon,
  Sed al mi restas—nur la rememoro!

FRIEDRICH HAHN, Bremen.

INTERNATIONAL LANGUAGE CLUB CROYDON

To commemorate their recent victory in the Town Planning Public Enquiry, and in appreciation of the work for international friendship carried on by its founder during the past nine years, the Club has decided to erect a large panelled shield with inscriptions in various languages. Among these in Esperanto, and the text runs—

"Ni, la anoj de la Lingva Klubo Internacia, deziras festi kun S-ro Terence J. Driscoll la venkon de la Klubo, kaj esprimi nian admiron pro lia kuraĝo kaj entreprenemo dum la lastaj naŭ jaroj. Ni konvinkiĝis pri la valoro de ĉi tiu eksperimento en "internacia vivado", kaj promesas nian tutkoran subtenon fari la Klubon vera Internacia Centro por frateco kaj pli bona kompreno inter la Popoloj de la Mondo".

The work is in the hands of an artist, and embellished with the emblems and flags of many nations, including the Green Star, will hang in the Club's lobby as a permanent memento.

CHAS. P. COCKS.

EL SIMIA PROVERBARO

(*Ni trovis la jenan manuskripton en la skribo de la mortinta S-ro William Bailey. Kiu ĝin verkis, ĉu li aŭ alia, ni ne scias.*—Red.)

1—Ne haltu por vin grati, kiam la arbaro brulas.
2—Malplena mano facile trairos truon, el kiu plena ne povos veni.
3—Ne ĉiam bona kerno en bela ŝelo.
4—Kiam diras homino "Ho! kia bela pelto!" forkuru sen adiaŭo.
5—Se vi flustris al amiko "Mi havas bonan kaŝejon", elserĉu alian.
6—Ridu antaŭ saltego, poste vi eble ne povos.
7—Ju pli alloga la enirejo, des pli pripensu la eliradon.
8—Pli bone unu nukso en la buŝo, ol tri en la mano.
9—La lasta banano estas tiu, kiu kostas vian vivon.
10—La branĉo sekiĝis: lasu al alia ĝin provi.
11—Dolĉa la mielo, sed akraj pikiloj ĝin gardas.
12—La plej bonaj fruktoj estas ĉiam ne atingeblaj.
13—Memoru, ke serpento kuras sen piedoj, kaj ke sago flugas sen flugiloj.
14—"Fortulo forrabis de mi nukson!" Do elektu malpli fortajn kunulojn.
15—"Venu vidi en mia spegulo, kiel bela vi estas", flatas la malsata krokodilo.
16—Kia kuraĝulo! Li tirus la voston de leono mortinta.
17—Ju pli multaj la buŝoj, des pli malgranda la manĝo.
18—Tro malfrue rekoni de interne kaptilon.
19—Amiko vin pinĉas—ridu! Malamiko vin karesas—gardu!
20—Ĉe akvujo la unuaj trinkos plej puran akvon.
21—Memoru, ke via tribestro havas multajn orelojn.
22—Morgaŭajnuksoj ne satigos hodiaŭ.
23—Vi surgrimpos multajn arbojn, antaŭ ol vi kaptos la lunon.
24—Ne la lango, sed la manoj, plenigas la ventron.
25—Facile moki, kiam alia sidas en kaptilo.
26—Du batalas, kaj tria akiras la bananojn.
27—Multaj donos konsilon, ne multaj bananon.
28—Porkoj scias, kie troviĝas ignamoj.

In Austria Esperanto is making good progress. *Aŭstria Esperanto-Revuo* appears regularly (Neutorgasse 9, Wien I); also a propaganda magazine *Die Weltsprache* (Rossauerlände 27, Wien IX). Both these magazines are excellent of their kind. Both (we note with pleasure) have decided to revert loyally to the Zamenhofan system of land-names, though provisionally preferring *Aŭstrio* to *Aŭstrujo* for their own land. No good reason is given for this exception, but this is a matter for the Austrians themselves to decide. In addition to these magazines a series of illustrated posters (18in. by 23in.) is appearing regularly; these are widely posted on walls and in public places.

Can any reader supply for the B.E.A. Library copies for July–Sept. 1938 of *La Juna Vivo* (Holland)? They are unobtainable in Holland.

We were tempted to break the rules and listen for a few minutes during prohibited hours to Radio Luxembourg on the afternoon of 30th March, to hear the station give the Scout Motto *Estu Preta!* in Esperanto, with a letter from Mr. Murphy in Ipswich, and news of Czech Esperantist Scouts.

The firm "Tramondo" (Neutorgasse 9, Vieno I) wishes to publish a number of Esperanto works (translated and original) in Esperanto, and perhaps also in German. (1) Literary contributions of all kinds (not tales of terror); (2) A large ethnographical work on post-war Europe; (3) An international literary Anthology. Contributions and promises of collaboration are asked for. We cannot print details here, but suggest that *verkemuloj* should write to the firm for full information.

MONOLOGO DE STENOTAJPISTINO

(*We reprint this brilliant little parody in response to repeated requests*)

Ĉu edziniĝi aŭ ĉu ne ? Tiel staras
Nun la demando. Ĉu pli noble estas
Elporti ĉiujn batojn, ĉiujn sagojn
De la fraŭlina sorto, kaj restadi
Nur stenotajpistino (laborante,
Ho, ve ! por edzo de aliulino),
Aŭ per la edziniĝo ilin fini ?
Liberi—ami—kaj nenio plu !
Konscii, ke ni tiel tute finis
Laboron de la plumo—la mil zorgojn,
Heredon de la poŝto—tio estas
Tre dezirinda celo ! Flirti—ami—
Edzini ! Jes—sed eble eksedzini !
Jen la barilo ! Kiaj malbonaĵoj
Viziti povas nian gevivadon
Post la forjeto de rutinaj devoj !
Jen tio nin haltigas ; tio faras,
Ke nia fraŭlineco longe daŭras.
Alie, kiu volus elportadi
La mokojn kaj kapricojn de la estro,
La premon de laboro, la fiŝercojn
De l' ĉefkomizo, polvon de la libroj,
Turmentojn de la bubo oficeja,
La katinecon, kiun ĉiu kolegino
Regalas al merito efektiva,
Haladzon de malkaraj cigaredoj
Malbonodorigantan ŝiajn harojn ?
Jes, kiu volus tion ĉi elporti,
Se mem, per unu vorto ĉe la pastro
Ŝi povus sin de ĉio liberigi—
Por kuirejo ŝanĝi oficejon,
Por forno aŭ lulilo skribmaŝinon ?
Kaj kiu do en ŝvito kaj en ĝemoj
La ŝarĝon oficejan volus porti,
Se ne pro tim' al riskoj kaj danĝeroj
De tiu nekonata land', el kiu
Neniu plu revenas, aŭ eskapas
Nur eksedziniĝante ? Kaj pro tio
Plivolas ni elporti ĉion ĝenan,
Ol flugi al mizeroj nekonataj.
Ĉi tiu penso tenas nin fraŭlinoj.
La plej kuraĝa edzinemulino
Pro tiu kaŭzo haltas sendecide,
Kaj ĉio restas penso, sed ne faro.

A.E.M.B.

We offer (for the benefit of the B.E.A. Library) *Oficiala Gazeto* complete (except the last number, 82) and *La Revuo* I–VIII (complete), for £3–10–0 each (unbound). First offer accepted. Write to 36 Penrhyn Rd., Kingston-on-Thames.

Mr. W. Goodes (Argentine) is returning to England shortly, and asks that from the beginning of June all communications should be sent to him at 107 Sussex Rd., Petersfield, Hants.

S.B.E.T. PASKA LERNEJO

La ĉiujara "Lernejo" de SBET okazis ĉe 68 Windsor Crescent, Bridlington, Yorkshire, 5–12 Aprilo.

Tio estis mia unua sperto de kunveno tia, kaj mi konfesas, ke mi iom antaŭtimis pri la neceso paroli Esperanton dum tuta semajno, kaj mem fari paroladon. Tamen, la unua kunveno tute forigis mian timon. Mi baldaŭ konsciis, kian bonegan okazon oni tie havas por akiri fluecon. Ĉiu volis helpi la aliajn, kaj mem akceptis tute nature helpon de aliaj. Multe helpis la diversaj programeroj : debato "Ĉu neŭtraleco estas ebla en la Esperanta movado ?"; interparolaj rondoj ; tradukado en grupoj ; paroladetoj ; diskutadoj ; legado de Georgo Dandin en Zamenhofa traduko ; posttagmezaj ekskursoj sur la marbordo, kaj komuna kantado. Aparte gravaj estis la specimenaj lecionoj de S-ro H. G. Toms, kaj diskutado enkondukita de F-ino Nixon pri "Internacia Organizo de Esperantistaj Instruistoj".

Unu tagon ni havis viziton de nia prezidanto, F-ino M. Jay, kiu bedaŭrinde ne povis resti pli longatempe. Ĉeestis ankaŭ afabla Franca kolego, S-ro Duthel el Lyons, kiu parolis pri la politika situacio en Francujo, kaj bonege ludis Georgo Dandin.

Oni tiel vere sentis sin en Esperantujo, ke, elirinte el la domo, oni havis la impreson esti kvazaŭ en fremda lando ! Mi nun komprenas, kial la membroj entuziasme partoprenas la lernejon ĉiujare.

La programo finiĝis per societa vespero, kaj kantado de *La Fino de Perfekta Tago*. Vere tio estis la fino de perfekta semajno. Tre dankindaj estas nia sekretario F-ino Nixon, la komitato, kaj aparte F-ino Bowell, pro bonegaj aranĝoj : ankaŭ niaj gastigantoj kaj samideanoj S-ro Booth kaj lia ĉarma edzino pro la tre afabla maniero, laŭ kiu ili akceptis nin.

C. G. LOVE.

NASKIĜOJ

Philip—Je 21 Marto, al Ges. A. E. Philip, 16 Windsor Rd., Higher Compton, Plymouth (antaŭe en Norda Londono), tria infano, Heather.

Delgado—Je 1 Marto, al Ges. Delgado, Ratcliffe Culey, Anglujo, filino, Anlucia.

MORTOJ

Lawton—Je 9 Marto, Ernest H. Lawton, 78-jara, tre malnova kaj entuziasma Esperantisto. Li ageme laboris por multaj bonfaraj movadoj, kaj estis tutmonde konata kiel "La Kvakera Orgenfabrikisto".

Dodd—Je 23 Jan., Ald. Archibald Dodd, J.P., St. Helens, Membro de B.E.A. Li multe helpis la lokan movadon.

I.E.L. AND U.E.A.

The Association has received from the Internacia Esperanto-Ligo the following communication regarding the scheme devised last year for a fusion of that body with the Universala Esperanto-Asocio. It is hoped to afford an opportunity for discussing the subject at our Annual Meeting on May 25th.

BERNARD LONG,
Hon. Secretary, B.E.A.

Al la Landaj Asocioj aliĝintaj al I.E.L.

Ni havas la plezuron sciigi al vi, ke ĉe la kunsido de nia Estraro dum Pasko kontrakto pri kunfandiĝo de IEL kaj UEA estas subskribita. La ĉefaj principoj estas jenaj :

1. Estos nur unu Esperantista internacia organizaĵo (neŭtrala). Ĝi havos du oficejojn : centran oficejon por la administra laboro en Anglujo kaj alian por dokumentado kaj servoj en Svisujo.

2. La gazeto ek de Majo havos la nunan formaton de *Esperanto Internacia* sed la titolon *Esperanto.* Kun la escepto de la oficiala parto ĝi estos redaktata de S-ro Hans Jakob en Ĝenevo, sed ĝi estos presata en Anglujo.

3. Estos nur unu Jarlibro, en du partoj kiel kutime, redaktata kaj eldonata en Anglujo.

4. La Komitato konsistos el :
(*a*) anoj elektitaj de la Landaj Asocioj aliĝintaj, kiel nun ;
(*b*) anoj elektitaj de la Delegitoj el internacia listo (la VD kaj FD ne partoprenos tiun voĉdonadon) po unu komitatano por ĉiu 250 delegitoj ;
(*c*) anoj, kiujn la komitatanoj elektitaj sub (*a*) kaj (*b*) alelektos ĝis kvarono de sia propra nombro (similaj al la ĝisnunaj komitatanoj B).

5. La titolo de la nova Asocio estos *Universala Esperanto-Asocio,* kaj ni do reiras al la tradicia nomo.

Ĉiuj necesaj informoj pri administrado, korespondado, k.t.p., aperos en la gazeto por Majo kaj en la Jarlibro.

La Estraro tre atente trarigardis la Statuton por fari la aliigojn necesajn por konformigi ĝin al la Kontrakto pri kunfandiĝo, kaj ankaŭ por enmeti kelkajn plibonigojn, kiuj montriĝis necesaj laŭ la spertoj dum dek jaroj. Post nelonga tempo ni submetos por via aprobo la proponitan novan Statuton de la kunfandiĝinta Asocio. Ni sendas la nunan mallongan informon por ke, se baldaŭ okazos via jara kunveno, vi informu vian membraron, kiu espereble aprobos la finon de la skismo en nia movado.

Ĉar estas nepre necese, ke la Komitato estu pli-malpli kompleta je la dato de la venonta Kongreso, ni devos tre baldaŭ okazigi la voĉdonadon por la komitatanoj sub 4.(*b*), eĉ neatendante la aprobon de la nova Statuto. Ni tamen havas nenian dubon, ke vi akceptos tiun ne tute laŭregulan agon, por ke en Bern la nova Komitato havu siajn unuajn kunsidojn, kaj ke tie la paco vere efektiviĝu.

C. C. GOLDSMITH,
8-*an de Aprilo* 1947 *Sekretario.*

THE BERN CONGRESS

The B.E.A. Travel Parties—Parties A and B are now both fully booked up.

Accommodation in Bern—The B.E.A. can book accommodation, so long as it is available, for members wishing to make their own travel arrangements.

Travel—The B.E.A. cannot undertake to procure tickets or advise on special itineraries. Please consult a Travel Agency.

32nd BRITISH ESPERANTO CONGRESS

Date—Whitsuntide, 24th–26th May, 1947.

Place—Imperial Hotel, Temple St., Birmingham.

Congress Fee—7/6 including Dance in the Connaught Room of the Imperial Hotel on the Saturday evening.

Enrolments—Over 120 members have joined.

Blinduloj—Free Congress tickets will be issued to all blind Esperantists and their guides. Will they please notify their intention of joining to Mr. W. Merrick, Penso, Shepperton, Middlesex.

The Programme—This was given in the March/April *B.E.*

Lodgings — Particulars regarding hotel accommodation are sent to all members on enrolment. Those who prefer accommodation in a private house please write at once to Miss B. Bowell, 98 Middleton Hall Road, King's Norton, Birmingham 30.

Excursion — A delightful excursion has been arranged for Monday, the 26th, to Warwick and Stratford-on-Avon. Price, including meals, 19/–. Enrolments should be sent at once to the B.E.A. Office.

THE PRESS BULLETIN

The B.E.A. regularly sends out a Press Bulletin to over 160 newspapers, periodicals and important bodies. It is thought that many readers might wish to receive the Bulletin (which contains useful information for propaganda), and we will send 12 consecutive copies to any member subscribing 4/– for this purpose. This should also meet the wishes of many who have asked for notes helpful to speakers.

Small Announcements

2d. per word. Minimum 2/- per issue. Prepaid. *Copy must be received at our offices by the 6th of the previous month.*

Monomark Service—Permanent London address. Letters redirected. Confidential. 4/- p.a. Royal Patronage. Write, Monomark, BCM/MONO5W London, W.C.1.

To Sussex Esperantists—Full stocks of all books in Esperanto kept. S. A. Hayward, Bookseller, 9 Station Street, Lewes, Sussex.

The Workers' Esperanto Movement (S.A.T.E.B.)—Esperanto with a purpose—world education for world socialism. Write for "The Worker Esperantist", the official organ, 3d. post free, to K-dino N. Walton, Summerfield, Wadsworth, Hebden Bridge, Yorks.

La Londona Esperanto-Spiritista Societo volonte ricevos de gesamideanoj raporton pri psikaj spertoj iliaj, se eble atestitaj. Skribu al—S-ino E. B. Knight, 270 Holly Lodge Mansions, London, N.6.

Amerika Esperantisto—1 year's sub, 6 issues, begin any month, post free 7/6. Essential to every Esperantist's propaganda kit. A lively, quality magazine. Order from The British Esperanto Association.

Socialist Guest House—Free and easy holidays in modernized, converted Farm House in beautiful Ribble Valley (Lancs.). Good and plentiful food. Home cooking. Tennis, Putting, Cricket, Croquet, Music, etc., etc. Easily accessible. 'Bus to gates. Full board from 70/-. Large stamped envelope for Brochure. Ni parolas Esperanton ! "Clarion", Clayton-le-Dale, nr. Blackburn.

F. Azorin's Universala Terminologio de la Arkitekturo—Second-hand copies of this work are required. Offers (with post-free price desired) to Secretary, B.E.A.

British Officer corresponds in Esperanto—348050 Lieut. A. J. Cameron, c/o National Bank of Scotland, Inverness.

British League of Catholic Esperantists—Details from Hon. Sec., Norman W. Vigar, 43 Defrene Road, London, S.E.26.

Holidays on the South Coast—Aldrington Lodge, 26 Portland Avenue, Hove, 3. Full board, 3½ guineas per week, doubles ; 4 guineas single rooms. Proprietors : Mr. and Mrs. J. Pearman. Ni ambaŭ parolas Esperante.

Hugo's German Course for sale—Write Paul Topham, 21 Weston Crescent, Bristol 7.

Mr. Mason Stuttard begs to inform authors and others that he does not give free advice on, or revise MSS. From now on such communications, if not accompanied by return postage, will be ignored. Those with postage will simply be returned.

B.E.A. Literary Service—Send stamp for particulars of facilities offered to authors and students. B.E.A., 140 Holland Park Avenue, London, W.11.

"Bank-notoj por interŝanĝo — Kompleta serio de japanoj bank-notoj en Malajo de 1ĉd ĝis $1000, por interŝanĝi kontraŭ 40 uzitaj P.M. aŭ 4 internaciaj kuponoj. Adreso : K-do LuBi, Hou Chio Publika Lernejo, 897 North Bridge Rd., Singapore".

Typewriter—Reconditioned "Oliver" for sale. Standard alphabet with extra Esperanto letters. Best offer over £12. Can be seen 140 Holland Park Avenue.

Deziras korespondi—50-jara Esperantisto, pri ĉiuj temoj, i.a. pri teozofio. Adreso : A. H. Tähtinen, Vanha Koivisto 32, Pori, Finlando.

Read "Youth Echo" 3d. 519 Barlow Moor Rd., Manchester, 29.

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj malnova Litova Esperantisto Pulgis Andrusevicius, Weidenstr 1, Trossingen, Germanujo (French Zone).

Kie Loĝi ?—Junaj esperantistaj geedzoj urĝe bezonas nemeblitan domon aŭ apartamenton—aŭ en, aŭ ne pli ol dudek mejlojn de Londono. Edzo estas studento ĉe Londona Universitato. Se oni povas helpi skribu al Ges. R. A. Newland, 32 Aldenham Avenue, Radlett, Herts., aŭ telefonu al Radlett 6632.

Why not Denmark ?—Good food at Esperanto Summer Schools in Elsinore (17th–24th July, 1947) in Hadsten (27th July–2nd Aug., 1947). Chance to visit Copenhagen, and S.A.T. Congress in Aarhus (2nd–7th Aug., 1947). Details : Mrs. M. C. Major, 140 Holland Park Avenue, London, W.11.

Books—Voice Culture, Mind-Training, Memory Efficiency, Psychology, etc. Wide range of Health Books. Stamp for list. From : BCM/Mailit, Monomark House, London, W.C.1.

Devon Holiday—Bed and Breakfast, 6/6 a day. Mrs. Firth, Millcombe, Black Awton, Totnes, S. Devon. Nearest station : Dartmouth.

Wanted : state price—(*a*) Internationale Sprachnormung in der Technik (Wüster 1931) ; (*b*) Pri problemo de internaciigo de Science-teknika terminaro (Drezen, 1935). H.J., 3 Spareleaze Hill, Loughton, Essex.

Deziras korespondi—(1) Prof. Pavel Halic, Str. Miron Cpstin 6, Arad, Rumanujo. (2) S-ro Wencelo Kiss, Str. Regal N/474, Praid, Jud. Odorheiu, Rumanujo, kun vegetaranoj.

INTERNATIONAL COLLABORATION AMONG TEACHERS

Directly after the war, a need was felt for collaboration amongst Esperantist teachers in all countries. TAGE, the former international organization, has ceased to function. After six months' discussions between the Esperantist teachers' Societies in Britain, France, Holland, and Sweden, a provisional committee has been set up, consisting of Miss V. Nixon (Britain), Miss J. Dedieu (France), Mr. P. Korte (Holland), and Mr. Einar Dahl (Sweden), who will represent their national organizations.

This Committee will have a Central Information Office, run by Einar Dahl, Uddevalla, Sweden—under the title Centra Informejo, Internacia Instruista Kunlaborado (IIK)—to collect and distribute information on Esperanto in schools. Letters needing a reply MUST be accompanied by a reply coupon.

The Committee hope that other countries also will form teachers' societies. In the meantime it is compiling a list of professional teachers willing to act as agents in countries where no national teachers' group exists, who will endeavour to form such groups, and be points of contact. This list will be published as soon as possible. The publication of a bulletin is also being considered.

Official Notices

THE BRITISH ESPERANTO ASSN. INC.

President : Miss Margaret Jay, M.A.
Hon. Secretary : Bernard Long, B.A.
Hon. Treasurer : A. Venture.
Secretary : R. B. Wilkinson.
Education Secretary : M. C. Butler, M.R.S.T.
Registered Office : 140 Holland Park Ave., London, W.11. *Hours*—Weekdays : 9 a.m. to 5.30 p.m. Saturday : 9 a.m. to 12.30 p.m. *Telephone :* PARK 7821.

NEW MEMBERS

Abbott, Miss M.	*Stroud*
Abramson, H. L.	*London, N.10*
Adams, Miss D. M.	*Sheffield*
Atherton, W. H.	*Derby*
Auld, W.	*Glasgow, S.W.2*
Baird, Miss A. D.	*Edinburgh* 5
Baird, Miss J. M.	*Edinburgh* 5
Barrett, Miss O.	*Bristol*
Beever, Mrs. E. Van	*Greetland, Yorks.*
Benoy, K. F.	*Plymouth*
Berry, Mrs. E.	*Leeds*
Berry, P.	*London, W.2*
Blance, W. H.	*North Shields*
Bolton, Miss A.	*Nelson, Lancs.*
Bulenda, P.	*Whitchurch, Shrops.*
Burnell, C. F.	*Bristol*
Burnett, Miss G. M.	*Bristol*
Byrne, Miss M.	*Dublin*
Caldwell, Miss C. S.	*Helensburgh*
Caldwell, Miss M. W.	*Helensburgh*
Cardy, Mrs. D.	*London, S.E.2*
Carter, Miss E. A.	*Margate*
Challinger, J. K.	*Castleford, Yorks.*
Chalmers, W. G.	*Wembley, Mddx.*
Chappel, J. A.	*Wallington, Surrey*
Claxon, A. E.	*Shipley, Yorks.*
Clayton, P. W.	*Grimsby*
Cooke, M. A.	*Bristol*
Crook, W. H. J.	*Bristol*
Davie, Miss J. P.	*Prestwick*
Davie, Miss L. C.	*Prestwick*
Deacon, Miss M.	*Liverpool* 17
Downer, Miss G.	*Torquay*
Downer, Miss L. G.	*Torquay*
Duckett, T. E.	*Bristol*
Farr, Mrs. G. E.	*Barry, S. Wales*
Forber, Miss I.	*St. Helens*
Foulds, Mrs. R.	*Matlock, Derbyshire*
Fulford, Miss D.	*Bristol*
Griffin, Miss F.	*Bristol*
Hargreaves, Mrs. L.A.	*Chaddesden, Derby*
Hattersby, C. M.	*Mexborough, Yorks.*
Hirst, A. E.	*Huddersfield*
Hockey, Miss M. J.	*Birmingham* 20
Hoe, W. L.	*Lincoln*
Hughes, F. C.	*Peterborough*
Hulson, Miss M. E.	*Weston-super-Mare*
Jones, Mrs. L.	*Lee-on-Solent, Hants.*
Kersley, Miss E. M.	*Leigh-on-Sea, Essex*
Kew, Rev. F. A.	*Bristol*
Kew, Mrs. F. A.	*Bristol*
Kew, Miss J. D. H.	*Bristol*
Kew, N. H.	*Bristol*
Kolatschevsky, N. J.	*London, N.19*
Lake, Miss N.	*Weston-super-Mare*
Lyons, J. D. M.	*London, E.17*
Lysowicz, C.	*B.A.O.R.*
MacArthur, A.	*Aberdeen*
Mapstone G. E.	*Weston-super-Mare*
Monks, F.	*Bristol*
Monkcom, H. L.	*Portsmouth*
Morgan, Miss B. E.	*Birmingham* 20
Nayler, Miss J. E.	*Maidenhead*
Osmond, Miss K.	*Weston-super-Mare*
Paget, B. L.	*Weston-super-Mare*
Parker, Miss B. M.	*Beckenham, Kent*
Paul, Miss M. J.	*Weston-super-Mare*
Phillips, Miss D.	*Bristol*
Phillips, Miss J.	*Bristol*
Powell, Miss G.	*Bristol*
Powley, S. A.	*Dunstable*
Priestley, H. E.	*London, E.13*
Quist, D. I. K.	*Hohoe (B. Togoland)*
Reardon, G. M.	*West Wickham, Kent*
Robins, Miss I. G.	*Birmingham* 20
Rogers, Miss E.	*Southport*
Ross, J.	*Offaly, Eire*
Shaw, J.	*Warrington*

Shephard, G. A.	*Torquay*
Skinner, Miss I. L. F.	*Taunton*
Smith, D. J.	*Berwick-on-Tweed*
Smith, R.	*Burnley, Lancs.*
Snow, D.	*Stoke-on-Trent*
Stevens, A. J.	*Bristol*
Stewart, W. B.	*Hong Kong, S.E.A.A.F.*
Stobbs, J. W.	*South Shields*
Urquhart, J.	*Dumfries*
Verth, R. J.	*Edinburgh* 9
Walmsley, J. T.	*Bradford*
Warren, Miss F.	*Grimsby*
Watson, J.	*Dunfermline*
Wild, A. S.	*Wilmslow, Cheshire*
Williams, Miss E. M.	*Felton, Som.*
Yeo, Miss J. N.	*Bristol*

Junior Members—

Allsop, P. W.	*Whitton, Mddx.*
Bays, A. J.	*Dagenham, Essex*
Beever, Miss J.	*Liversedge, Yorks.*
Blomfield, J.	*Dagenham, Essex*
Bristow, R.	*Dagenham, Essex*
Budd, Miss J.	*Bristol*
DaRocha, B. K.	*Cape Coast, Gold C'st*
Dronfield, Miss M. R.	*Matlock, Derbyshire*
Fairbank, A.	*Newcastle-on-Tyne*
Fenton, Miss N. J.	*Southampton*
Gormley, R.	*Sunderland*
Hargreaves, Miss N.L.	*Chaddesden, Derby*
Hargreaves, P. W.	*Chaddesden, Derby*
Horrigan, R.	*Dagenham, Essex*
Iveson, P. H.	*Todmorden, Lancs.*
Korn, M. E.	*London, N.W.6*
Landsman, R.	*Michigan, U.S.A.*
Poppleton, Miss D. B.	*Grimsby*
Preece, Miss C. E.	*Newport, Mon.*
Prime, J. H.	*Cambridge*
Redgewell, R.	*Dagenham, Essex*
Ryan, J. C.	*Omagh, N.I.*
Smith, A. J.	*Dagenham, Essex*
Smith, P. H. A.	*Leicester*
Stephenson, Miss C.	*Newcastle-on-Tyne*
Stephenson, Mrs. O.	*Newcastle-on-Tyne*
Winston, D. G.	*Dagenham, Essex*

CANDIDATES FOR FELLOWSHIP

Bereseforde, J.	*London, S.W.17*
Read, E. R.	*Woodford Green*

NEW LOCAL DELEGATES

Blackburn—D : H. Benson, 189 Lammack Road, Blackburn, Lancs.

Shotts — D : S. Lisauskas-Smith, 14 Benhor Road, Shotts, Lanarkshire.

B.E.A. EXAMINATION SUCCESSES

Diploma—E. Revill, *Manchester*, 13.

Advanced Examination—Written Part—H. D. Jones, *Liverpool*, 12.

DONATIONS TO B.E.A., FEB.–MAR.

J. Course, £3 ; P. H. Lewis, £1. 5s. ; Mrs. E. M. Robertson, £1 ; Mrs. A. V. Morris, 12/– ; Mrs. E. M. Brook, M. Dickson, Miss J. W. Downie, H. M. Ison, Miss D. E. Jackson, Mrs. E. Kendrick, Miss G. H. Moxon, E. K. Osmotherley, Miss E. C. Saunders, D. Tilly, 10/– ; G. B. Atkinson, Dr. D. W. Collings, Mrs. N. Goodliffe, A. Woodley, 6/– ; Dr. T. C. Baillie, P. Blaise, Miss R. E. Crouch, Miss D. Dawe, Miss M. J. Harding, C. H. Maxwell, Miss E. F. Paraige, R. Sharp, R. N. Whitcombe, Miss K. M. Wolledge, 5/– ; R. Goldsmith, D. E. Kerghley, 3/– ; Miss E. W. Anderson, T. C. Brookes, Mrs. M. E. Eagling, Mrs. T. Salmon, Mrs. L. K. Shelson, F. Sons, A. A. Wilson, 2/6 ; Miss M. F. Clark, B. M. Harold, Miss A. Stephens, 2/– ; T.J.G., 1/11 ; N.G.W., 1/3 ; C.D.C., K.P.C., A.W.C., E.A.J., 1/– ; K.J.M., 3d.

DONATIONS TO ADVERTISING AND PUBLICITY FUND, FEB.–MAR.

J. Course, £2 ; T. Cumner, £1 ; Mrs. E. M. Robertson, Mrs. M. Holmes, H. M. Ison, Mrs. Seddon, Miss K. M. Wolledge, 10/– ; Miss L. A. Barrows, Mrs. N. Goodliffe, Miss A. Stephens, R. R. Tredgold, H. H. Winter, 5/– ; Miss M. F. Clark, 3/– ; Miss E. W. Anderson, 2/6 ; A.B., M.E.A., 1/6.

DONATIONS TO SUSTENTATION FUND FEB.–MAR.

M. Dickson, 10/– ; Miss K. M. Wolledge, 5/–.

Grateful thanks to all donors.

R. B. WILKINSON, *Secretary*.

The British Esperantist

Publishers :

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, INC.

140 HOLLAND PARK AVENUE, LONDON, W.11.
Tel. : PARk 7821.

Editor : MONTAGU C. BUTLER, M.R.S.T.,
36 PENRHYN ROAD, KINGSTON-ON-THAMES, SURREY.
Tel. : KINGston 1484.

Contributions should be typewritten, and sent in by the 8th of the previous month. The Editor reserves the right to refuse, correct, or shorten them. He is not necessarily in agreement with views expressed in signed articles, but accepts responsibility for those unsigned.